Universala Esperanto-Asocio (en oficialaj rilatoj kun UN kaj Unesko)

La 2-a Virtuala Kongreso de Esperanto • 17 – 24 julio

# La Kolombo de Paco

**30-a de junio 2021, numero 3**

Redaktas Dmitrij Ŝevĉenko kaj Anna Striganova

## Kurso pri parolarto "#forlaflatado: lernu prelegi en 10 simplaj paŝoj" ofertita de UEA

La retkurson "**#forlaflatado**: lernu prelegi en 10 simplaj paŝoj" eblas nun sekvi senpage laŭ oferto de UEA al la Esperanto-komunumo. La kurson preparis Leandro Abrahão, ano de la Komisiono de UEA por la Oratora Konkurso. Ĝia disponigo al la Esperanto-komunumo okazas strategie al UEA cele al kapabligo de esperantistoj, pro kio la Estraro de UEA decidis ĝin aŭspicii. Parolarto estas aparte proksima de la lingva afero kaj estas studkampo speciale ligita al la historio de la Asocio, ĉar pri ĝi okupiĝis ekzemple prezidantoj de UEA kiel Ivo Lapenna, Humphrey Tonkin kaj Duncan Charters.



La plej tikla afero rilate parolarton estas ne tio, kiel oni movas la manojn aŭ voĉas, sed la nescio pretigi prelegoplanon. Sen tio oni nur malfacile scios, kion diri, kion fari, kion montri kaj sekve kiel movi la manojn. Ĝuste tion, kaj ne nur, solvas la ofertita retkurso. La metodo estas bazita sur la principoj de "TED Talks" – nuntempe la plej elstara ekzemplo de efikaj kaj trafaj prelegoj. La kurson oni povas fari pere de la platformo Udemy (necesas registriĝi, kio tamen estas senpage kaj rapide farebla): udemy.com/course/forlaflatado. La prezentpaĝo de la kurso estas: forlaflatado.com/retkurso. La esprimo **#forlaflatado** klariĝas en la unua leciono.

La kurso konsistas el 12 lecionoj, pli precize 12 ĉ. sep minutojn longaj videolecionoj, kiujn oni povas spekti iam ajn, kiom da fojoj oni deziras, per komputilo aŭ per poŝtelefono. Entute la kurso daŭras 1h20. La lecionaro sidas ankaŭ en la tre moderna platformo Udemy, elŝutebla kiel apo por Androidaj kaj iOS-aj aparatoj aŭ uzebla per retumilo. Pere de la platformo oni povas elŝuti la lecionojn kaj spekti sen la bezono esti konektata al la interreto. Kaj, krom la videoj, kelkaj moduloj enhavas elŝuteblajn materialojn aŭ prelegilojn, kiuj helpos vin pretigi vian prelegon. Ili estas PDF-dokumentoj, kiujn vi povas printi laŭplaĉe. Krome, en la plimulto el la moduloj vi trovos ligilon de spektindaj prezentaĵoj el TED Talks por inspiriĝi aŭ kompletigi vian studadon.




En UEA Ivo Lapenna dum jardekoj okupiĝis pri Esperantlingva oratorado. La verŝajne sola Esperantlingva libro pri la temo (*Retoriko*: katalogo.uea.org/katalogo.php?inf=2725) publikiĝis danke al li antaŭ 70 jaroj (1-a eldono en 1950). Jen kion diras William Auld pri lia oratora kapablo: "Se la leganto jam aŭdis Profesoron Lapenna, sufiĉas diri, ke li superis sin mem. Se ne, mi povas nur raporti, ke aŭdinte la paroladon, oni dubas, ne pri la perfekta taŭgeco de Esperanto por oratorado, sed pri la taŭgeco de ĉiuj aliaj lingvoj" (El *Sed homoj kun homoj*, p. 114: katalogo.uea.org/katalogo.php?inf=7359).




La kurso **#forlaflatado** ankaŭ estos parto de la 2-a Virtuala Kongreso de Esperanto: vk.esperanto.net – se vi ankoraŭ ne aliĝis, ĝis la 4-a de julio individuaj membroj de UEA povas aliĝi senpage.

*Gazetara Komuniko 957*

# Asocio Nova Familio (ANF) agadas en Goma, DR Kongo

Betti Maul

Aktualaj kaj urĝaj projektoj estas du: rapida helpo post la erupcio de la vulkano kaj la projekto pri geonkloj.




Por ĉiuj kiuj ankoraŭ ne konas la *Asocion Nova Familio* (*ANF*): Ĝi estas bonfara organizo, kiu agadas en la urbo Goma, en Demokratia Respubliko Kongo. Ĝia celo estas prizorgi infanojn, kiuj perdis siajn gepatrojn pro la intercivitana milito en la lando.

## Vulkano erupciis post 20 jaroj



Dum mi skribis ĉi tion, en la dumiliona urbo Goma, orienta parto de Demokratia Respubliko Kongo, regas granda paniko kaj kaoso: post pli ol 20 jaroj da intercivitanaj militoj kun multaj suferoj kaj mortigoj, la 22-an de majo 2021 la proksima vulkano *Nyiragongo* erupciis. La lafo fluis en la urbon Goma, malaperigis multajn domojn, fendiĝis stratoj kaj vojoj, el kiuj elvenis varmega lafo, multaj homoj perdis ĉion. Sekvis fortegaj tertremoj, kiuj aldone detruis multon.

Nin tre tuŝas tiuj novaĵoj, ĉar rande de Goma vivas multaj georfoj, kiujn nia bonfara internacia organizaĵo Asocio Nova Familio prizorgas. En 2019 estis ankoraŭ ĉirkaŭ 130 infanoj, en majo 2021 jam pli ol 200 georfoj, por kiuj ni organizas lernejokotizon, manĝaĵojn, vestaĵojn, lernejomaterialojn, medicinan helpon kaj al kiuj ni ankaŭ instruas Esperanton.

Pliajn informojn trovu en la Reta Revuo: http://revuoesperanto.org/afriko_vulkano.

# La 2-a Virtuala Movada Foiro dum la 2-a VK

Anna Lowenstein

Kiel pasintjare la 2-a Virtuala Movada Foiro (ViMF) okazos en la kadro de la 2-a Virtuala Kongreso de Esperanto (VK). Tial partoprenantoj devas esti aliĝintoj de la 2-a VK: se vi ankoraŭ ne faris, bonvenu tuj aliĝi per https://vk.esperanto.net.

La 2-a VK okazos dum la semajno 17-24-a de julio 2021, dum la horoj 12h00 ĝis 18h00 UTC. La 2-a Virtuala Movada Foiro okazos dum la samaj tagoj, sed antaŭ aŭ post la horoj de la kongreso mem, t.e. antaŭ 12h00 kaj post 18h00. Tiam asocioj rajtos uzi la virtualajn ĉambrojn por prezenti sin kaj sian agadon. Ĉiu asocio rajtos prezenti sin dum unu horo.




Kiel prezenti sin? Same kiel en la fizika Movada Foiro, eblos montri fotojn, revuojn, flugfoliojn kaj ankaŭ paroli kun la vizitantoj. La sistemo estos sama kiel en Jitsi aŭ Zoom: oni povos paroli kun ĉeestantoj, vidi ilian vizaĝon, dum per la elekto "Kundividi la ekranon" eblas samtempe montri fotojn aŭ fari bildprezentojn, kiujn oni havas en sia komputilo. Estas iom maloportune moviĝi rapide de unu dokumento al alia (ekzemple moviĝi de foto al revuo), do ni sugestas, ke vi metu ĉion, kion vi volas montri, en unusolan dokumenton, ekzemple en bildprezenton de Powerpoint aŭ simile, tiel ke vi povu rapide montri ekzemple kovrilojn kaj kelkajn internajn paĝojn de viaj revuoj, paĝojn el viaj flugfolioj, informojn pri membriĝo ktp.

Se vi interesiĝas, bv. plenigi la Aliĝilon al la 2-a ViMF: https://mallonge.net/ViMF21.

https://www.facebook.com/esperantorevuo

**Sekvu la revuon *Esperanto* kaj la Retan Revuon**

https://twitter.com/revuo_esperanto

# BET-56 denove okazos en Litovio

Povilas Jegorovas

Du jarojn laŭvice ne povis okazi la tradicia ĉiujara somera internacia esperantista aranĝo Baltiaj Esperanto-Tagoj (BET). Finfine post tiu deviga pandemia interrompo interkonsente kun Esperanto-Asocio de Estonio kaj kun Latvia Esperanto-Asocio la 56-aj Baltiaj Esperanto-Tagoj en 2022 denove okazos en Litovio reale kaj fizike. Ĉi-foje BET okazos en la litovia havenurbo Klaipėda apud Balta maro la 9–17-an de julio 2022. Klaipėda laŭ grandeco estas la tria urbo de Litovio. BET-56 funkcios en la universitato de Klaipėda.

Esperantistoj havos tre luksajn kondiĉojn por laboro kaj ripozo. Ni povos senlime uzi la tutan infrastrukturon de la universitato (kunsidejoj, salonoj, aŭditorioj, studentaj domoj, universitata kafejo, komputiloj, alia organiza tekniko ktp.).

Krom tio, la universitato havas sian botanikan ĝardenon, kiun eblos ne nur viziti, sed kie eblas ankaŭ organizi iajn programerojn. La universitato havas du ŝipojn, "Brabander" kaj "Odisėja", kiujn eblos uzi por duontagaj ekskursoj en la maro. La partoprenantoj de BET-56 loĝos en studentaj domoj de la universitato, de la ŝtata kolegio, de la marista lernejo, de la turisma lernejo kaj laŭdezire en diverskategoriaj kaj diversprezaj urbaj hoteloj. Ankaŭ manĝado estos organizita.

BET-56 havos ĉiuspecan subtenon kaj helpon de la urbaj instancoj de Klaipėda kaj de la tutlandaj ŝtataj instancoj.

Ni organizos vere altnivelan internacian esperantistan aranĝon kaj organize kaj programe. Litovaj esperantistoj faros ĉion eblan por kontentigi ĉies dezirojn kaj gustojn.

Ni atendas minimume 500 gastojn el 30-40 landoj. La kvanto de partoprenantoj ne estas limigita.

Bonvolu jam nun plani vian partoprenon en BET-56. Notu tiujn datojn en via sekvontjara Esperanto-Kalendaro.

Ĉiuj estas petataj disvastigi ĉi tiujn informojn pri BET-56 vaste tra la tuta mondo.

Fine de julio 2021 aperos Informa Bulteno pri BET-56 kun ĉiuj bezonataj detalaj informoj kaj aliĝilo.

# Esperanto-kurso en Barato

Syam Sundar Pal

Dhruba Chand Haldar College (DCHC) kunlabore kun FEB-Kalkato organizas mallongan kurson kiel kromkurson. Sovona Ghosh, mia studentino kaj nun la fakestro de tiu kolegio, estas la organizanto de tiu programo. Krom Sovona, A. K. Nandi, Samaresh Chakraborti kaj mi instruos tie. Jam aliĝis 89 gestudentoj kaj la kuraso komnciĝis de 24-a de junio, 2021. Mi jam faris la instruprogramon kaj sendis ĝin al 3 aliaj instruistoj por diskutado.



Finfine 175 gestudentoj aliĝis kaj ni devis enlistigi la gestudentojn en du grupojn, A kaj B (90+85). Ni sukcese prenis la klasojn kaj la unua tago estis destinita por enkonduka parolado. Estis decidite ke S. S. Pal kaj Ajoy Kumar Nandi instruas al la grupo A kaj Sovona Patronobis kaj Samares Chakraborti la grupon B.


2a VIRTUALA KONGRESO DE ESPERANTO
17–24 de JULIO 2021

**Jam aliĝis pli ol 1100 partoprenantoj!**

**Ĉiuj membroj de UEA povas aliĝi senpage ĝis la 04.07.2021!**

**Pliaj informoj ĉe *vk.esperanto.net***

# Germana gazeto raportas pri TEJO

Fernando Maia Jr.,
Renato Corsetti

La germana gazeto Braunschweiger Zeitung parolas pri Esperanto kaj specife pri TEJO-agado: la granda foto estas de la TEJO-projekto "Florigu Egalecon Inter Junuloj" – https://genraegaleco.tejo.org/. Deutsche


Wochenend

Per Esperanto tra la tuta mondo

„Mit Esperanto durch die ganze Welt" – Michaela Stegmaier sowie Andreas und Sigrid Abel sprechen die Plansprache.

Esperanto-Jugend kaj Michaela Stegmaier kontribuis. Leo Patek diskonigis post aliaj grupoj en Facebook, kiel ankaŭ Ĉina Radio Internacia. En la Informa Reto pri Esperanto, mastrumata de UEA, Henri Masson atentigis, ke la gazeto Braunschweiger Zeitung jam plurfoje raportis pri Esperanto: https://mallonge.net/ei. Klaus Leith, membro de la Eŭropa Komisiono de UEA, komplementis: "Braunschweiger Zeitung estas regiona ĉiutaga gazeto kun diversaj lokaj eldonoj en la federacia lando Malsupra Saksio". Pro la loka fokuso legantoj eksterregionaj aŭ eksterlandaj ne estas multaj. Tamen ili kalkulas je 90 000 venditaj paperaj ekzempleroj. "Wochenend" estas la semajnfina artikolaro. Krom tio, la ĵurnalistino de la gazeto alvokis ankaŭ la Esperanto-Centron Herzberg, jam en printempo, por akiri informojn por sia artikolo pri Esperanto. Braunschweig mem estas ĉ. 80 km for de Herzberg, kie ilia eks-tudentino Michaela Stegmaier nun loĝas. La artikolo aperis en la 19-a de junio 2021 ankaŭ en la regiona gazeto HarzKurier kaj krome en pluraj gazetoj en la tuta regiono, do verŝajne ĝi atingis centmilojn da legantoj. La artikolojn vi trovas ankaŭ sur la hejmpaĝo Esperanto-Centro Herzberg: http://esperanto-urbo.de/blog.php.

# Nova klubo en Harare

Elisée Byelongo Isheloke
Kunordiganto de la Afrika Komisiono de UEA

Mi skribas por sciigi, ke la 1-an de junio 2021 ni sukcese kreis novan klubon en Harare, Zimbabvo. Iniciato anoncita en la komisiona kunveno de la Afrika Komisiono kaj efektivigita de mi kun la helpo de samideanoj. Almenaŭ 14 homoj, inter kiuj la plimulto estas junaj virinoj, lernis Esperanton dum konferenco organizita de mi kaj gastigita de Women Advocacy Project en la ĉefurbo Harare, Zimbabvo.

Por subteni tiun kampanjon aŭ agadon, kiu celas revivigi Esperanton en Zimbabvo post la forpaso antaŭ relative longe de Prof. Oliver Mazodze, eminenta esperantisto, ni bezonas lernolibrojn, vortarojn, kompaktdiskojn, DVD-ojn kaj iom da mono por administraj aferoj de la novnaskiĝinta klubo. Mi fidas je la kunlaboro de esperantistoj por kreskigi tiun nian belan bebon en Zimbabvo. Mi planas alian trejnadon por tiuj komencantoj, kiuj multe scivolemas pri Esperanto kaj nia komunumo.



Kursmaterialojn, lernolibrojn kaj vortarojn bonvolu sendi rekte al: C/O S-ro Akenga Mnyaci, 2745 Princess Margaret street, Marlborough, Harare, Zimbabwe.

Por aliaj helpoj bonvolu uzi la konton Afriko de UEA, https://www.uea.org/alighoj/pagmanieroj, kun la indiko «Por Harare», aŭ en okazo de duboj bonvolu kontakti min aŭ Renato Corsetti. Bonvolu ankaŭ informi la Afrikan Komisionon pri aliaj sendoj de materialoj.

**Sekvu kaj abonu la Gazetarajn Komunikojn de UEA por informiĝi pri freŝaj novaĵoj ĉe:**

***https://uea.org/aktuale/komunikoj***